

# Gazeto Andaluzia




ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

N° 28 • 8-a Jarkolekto • JULIO/DECEMBRO 1991

## ANDALUZIO

*En la Centro de la Mondo !!!*

**EXPO'92**  
SEVILLA



Universala Ekspeziicio \* Seviljo Aprilo/Oktobro 92



# ĈEFARTIKOLO

Meditante pri la realo, oni komprenas la kialon de la nuna situacio de la Movado en Andaluzio. Jam pasis multe da jaroj de kiam aperis en nia regiono la unuaj esperantistoj. Ili, plenaj de entuziasmo laboris por enradikiĝi Esperanton kaj, kune kun aliaj hispanaj samideanoj sukcesis ke ĉi tiu lingvo estu ŝatata de granda nombro de samlandanoj. Tiam ili faris tion kio en tiaj cirkonstancoj konvenis, ili fieris pri siaj opinioj kaj ni ĉiam devos dankemi al ili.



Post tiom da tempo, la andaluzia socio havas aliajn prizorgojn kaj, tiel la interesoj kiel la valoroj estimataj de la nuntempuloj tute malsamas al tiuj de la andaluzoj de la unua jarkvarono. Tio, kaj la impona influo de la amaskomunikiloj postulas malsamajn strategiojn kaj agadplanojn. Kiu devas esti la bazaj linioj de nia porEsperanta agado en nia tempo? Kio estas fundamenta kaj kio akcesora? Kiu estu la celoj de la Esperanto-Asocioj? Kion oni devas atingi unue, kion due...? Ja, estas multaj problemoj en Esperantujo, multaj revoj, multaj agadplanoj dum mankas kapabluloj inter ni. Nur per la sistema pritraktado de niaj eblecoj fare de respondeculoj amantaj la lingvon ekaperos solvojn al la nuna malkontentiga situacio.

Kion plenumu la Asocioj? Ĉu sufiĉas malprofunda kono de la Movado kaj de la lingvo por allogi la neesperantistojn? Ĉu la Asocioj kapablas havigi interesajn agadprogramojn al la personoj kiuj alproksimiĝas al la Movado impulse de sinceraj deziroj ekspluati ĉiujn eblecojn de Esperanto?

Al ajna veterana esperantisto evidentas, ke niaj Asocioj agadas entuziasme, sed blinde. Ili ne sukcesis enkapigi en la membrojn la neprecon kapabliĝi maksimume kaj ĝisdatigi siajn konojn. Jes, se ili estus subtenintaj de potenculoj, ili estus sukcesintaj. Ankoraŭ hodiaŭ mem multaj esperantistoj opinias, ke ununura solvo por realigi siajn revojn estas, ke la politikistoj kaj la registaroj alprenu la taskon defendi kaj disvastigi Esperanton. Tamen, ili scias tre bone, ke nunne probable nek espereblas, tia helpo. Nu, la rezultatoj memvideblas: la Movado stagnas kaj, anstataŭ influi efike en la socion, ĝi restas kiel kultura movadeto.

Por multaj samlandanoj Esperanto estas nur kuriozaĵo: ili ali-  
ras nin kun antaŭjuĝoj kaj oni apriorie malsatas nian lingvon. Nu, urĝas  
kontraŭbatali kaj renverŝi multon. La necesa saĝeco por plenumi la tas-  
kon, mankas al ni tre ofte. Tute ne konvenas improvizi: la kaŭzoj de la  
problemo estas tre komplikaj kaj estas necese agadi paŝon post paŝo,  
senhaste kaj senĉese, antaŭvidinte ĉiujn eblecojn venontajn.

Resume, estas nepre forigi la ĝisnunan amatorismon kaj krei  
seriozan teamon de kapabluloj. La grandeco de la Esperanta afero postu-  
las agadi serioze, konstante, lerte kaj inteligente.

ANDRES MARTIN GONZALEZ




## VOJAĜU KUN NI AL OLHAO !

Okaze de la Portugala Kongreso de Esperanto okazonta la 14an  
kaj 15an de Decembro (sabato kaj dimanĉo) en la urbo Olhao, la Andalu-  
zia Esperanto-Unuiĝo planas organizi vojaĝon por partopreni. Olhao si-  
tuas je la suda portugala regiono Algarvo (vd. apudan mapon), ĝi enha-  
vas 15.000 enloĝantojn kaj estas la dua urbo plej grava de tiu regiono.

Krome, Olhao estas unu el la plej allogaj turismaj portugal-  
zonoj, kaj siaj konstruaĵoj, promenejoj kaj etoso memorigas la araban  
nord-afrikon. Se ni ricevas sufiĉajn aliĝ-petojn oni luos buson por  
vojaĝi, se ne ni iros tien per aŭtomobiloj.

Se vi deziras partopreni kontaktu kun ni kiel eble plej bal-  
daŭ:

- Per letero: AEU Poŝtkesto 864 29080 MALAGA
- Per telefono: Julio Herrero 952-25-09-76



# ARTEFARITA LINGVO EN HELENISTIKA GREKIO

Neniu supozus, ke ionete post Aleksandro la Magna jam estis artefarita lingvo. Sed jes ja, Aleksarko, frato de la makedona reĝo, kreis lingvon por sia urbo, Uranopolis (ĉiel-urbo). Aleksarko estis la urbon Uranopolis, sub la protekto de sia frato Kasandro. Oni fondis ĝin proksimume en la jaro 316 a.K. Neniu scias ekzakte kie troviĝis la urbo; tamen, oni ja trovis monerojn kaj orajn kaj arĝentajn. Laŭ la greka kutimo, oni devus trovi sur la moneroj ienan enskribon: de la urbo de la ĉielurbanoj. Tamen, tio, kion oni legas estas "uranidon", t.e., "de la filoj de Urano (dio de la Ĉielo)".

Oni kredas, ke Aleksarko projektis, ke dioj loĝu en Uranopolis, tial tia utopia urbo bezonus idealan lingvon. Aleksarko konis profunde la grekan literaturon, kaj tre interesiĝis pri etimologiaĵoj. Jam en la greka literaturo estis populara opozicio "dia lingvo < homo lingvo". Tial, Aleksarko projektis artefaritan lingvon por sia dia urbo.

Kia estis tiu lingvo? Ĝi devis esti komprenebla, sed malsama al tiu de la homoj. Oni nur konservas kvin ekzemplojn, necitajn de Ateneo, erudito greka, kaj la komencon de letero de Aleksarko al la estroj de Kasandria, urbo fondita de sia frato.

La procedo nomiĝas "kenningar" t.e. uzi poeziajn ĉirkaŭfrazojn anstataŭ komunajn vortojn. Ekzemple: por koko "tagiĝblekiĝo": anstataŭ barbiro, "mortemulrazigito".

Aleksarko kreis "specialan lingvon", kiu fakte estis la greka lingvo (neniu greko povus imagi ion alian) por sia ĉiela urbo. Oni ne povas scii, ĉu en Uranopolis oni parolis tian lingvon aŭ ne. Sed estas certe, ke li planis lingvon, kompareblan kun nia lingvo. Kvankam ĝia celo malgatis, oni ja vidas ke en Grekio estis artefarita lingvo.

*Jose Fco. MARTIN DEL POZO*



# DOSIERO: USSR

En la pasinta numero de GAZETO ANDALUZIA aperis sur la kovrilo kia ra titolo "USSR, la ringo de Imperio", tamen ene de la paĝoj de tiu revuo aperis neniu informo pri tiu temo. Tio suldiĝas al la fakto ke la okazintaĵoj de Sovetunio dum la monato Aŭgusto ankoraŭ estis tro apudaj kaj freŝaj por aperigi komentariojn pri ili. Tamen hodiaŭ, jam kelkaj monatoj poste, ni volas pludiri pri tiu temo; efektive unu el la du imperioj kiuj nuntempe regas la teran teron faligis. Ni provis redakti kelkajn artikolojn por kompreni la nuntempan situacion.

Tio kion unue oni komprenas post legi la nomon Unio de Socialistaj kaj Sovetaj Respublikoj estas ke ĉi lando estas are da landoj, tio almenaŭ estas vera teorie, kaj kun la Soveta Konstitucio enmane la USSR estas lando eĉ pli ol federala. Laŭ la tekstoj la respublikoj en la USSR havas pli da decid-povo ol la "landoj" en Germanio, la ŝtatoj en Usono aŭ la aŭtonom-komunumoj en Hispanio; tamen ĉi tio estas vera nur en la leĝaro, ĉar ĉi temas pri "ne-reala federalismo", kiel asertas Andreo CATONE en sia verko "La Defaligo de la Ne-reala Federalismo".

Tamen kelkaj aspektoj de la soveta revolucio indikas ke la USSR naskiĝis kiel vera federala ŝtato. La revolucio en 1917 disvolviĝis tra Ruslando, tiam imperio unuigita de la caraĵ armoj, kelkaj el la landoj de ĉi imperio havis tre difinitan nacian konsciencan, kaj tiele ili vidis la revolucion kiel la finon de la imperio kaj la naskiĝon de neta libereco. La nova USSR, sub la regado de Lenin, sendependiĝis Finlandon, Latvion, Estonion, Letonion kaj Azerbajĝanon, ankaŭ ekde la unua soveta

## LA LANDOJ EN LA USSR

Konstitucio oni agnoskis la rajton de la landoj sendependiĝi, oni kreis proprajn nacian simbolojn, landajn parlamentojn kaj proprajn registarojn, kaj ĉi tio signifis impulson por la konstituo de USSR kiel lando de "liberaj landoj".

Tamen ĉi pozitivaj aspektoj finiĝis kun la atingo de la povo fare de Stalin. Iozif Stalin intencis firmigi USSR kiel ŝtaton kaj ene de ĝi la revolucion, mal simile Trotsky pretendis disvasti la komunistan revolucion tra la mondo, konsiderante USSR ne kiel la soveta ŝtato sed kiel la inicianton de la sovetismo. Dum la epoko de Stalin kaj same dum Kruŝov kaj Breznev oni helpas la rusigadon de la tuta lando, la lingvoj kun ciriliaj alfabetoj ŝanĝiĝas, la rusoj migras al aliaj respublikoj kaj la kultura, scienca, politika kaj mi-

litista klasoj formiĝis en Moskvo. Same Stalin ne dubas uzi perforte la povon de la centro por solvi linajn disputojn aŭ kiam li forpelas milojn da enloĝantoj de unu al alia teritorio, ekzemple en tiuj respublikoj kiuj apogis aŭ helpis la hitleran invadon dum la dua mondmilito. Stalin sekvas la devizon "divide et impera" (dividu kaj imperiu) por atingi ke la rusa centro povos aperi kiel la "ĉiopova instanco" kiu ĉion povas solvi.

Sed tiam, kio okazis en USSR? Kial hodiaŭ eĉ la plej malgranda respubliko pretendas sendependiĝi? La respondo aperas facile, la perestrojko malfermis la "Pandora Skatolo" de ĉiuj nacioj, hodiaŭ eĉ Ruslando, la centro de USSR, deziras sendependiĝi, ĉu imageblas en Hispanio sendependa Kastilio? En 1989 Gorbaĉov proponas la mem-financadon de la respublikoj, kaj tio provokis kontraŭan rezulton por la Unuiĝo. La respublikoj erare agadis ekonomie kiel izolitaj insuloj, tiel la malbo-

---

Komence de nia jarcento kaj post la rus-japana milito de 1905, la rusa burĝ-klaso organizis ĝeneralan strikon, Nikolas la 2a, la lasta caro, estis devigata publikigi la "Oktobran Deklaron" kie li promesis la popolan elektadon de Parlamento, la Duma. En 1907 same oni ekigis la agrikulturan reformon. En 1914, dum la unua mondmilito Ruslando luktis kontraŭ Germanio: la manko da manĝaĵoj, la ne-kontentiga disvolvo de la milito kaj la popolaj protestoj provokis en la ĉefaj urboj manifestaciojn de la laboristoj. Naskiĝis ti

naj ekonomiaj rezultoj kaj la senlaboreco utilis kiel reklamiĵoj por la ekigantaj naciaj movadoj. Gorbaĉov forlasis la ideon pri "soveta popolo", kio havis ne etnian sed politikan bazon, kaj admisiis la sendependon de la baltaj respublikoj unu e kaj treeble poste la sendependon de aliaj respublikoj; por kune formi ekonomian kaj politikan kunfederacion simila al la Eŭropa Komunumo.

La ne-reala federalismo en USSR defaliĝis post malmultaj jaroj de la komenco de la perestrojko, hodiaŭ la danĝero sendube estas la "jugoslaviĝo" de USSR, tio estas konstataj kaj kruelaj inter-respublikaj konfliktoj pro teritoriaj aŭ etniaj problemoj, ĉar hodiaŭ jam ne ekzistas la fortan rusan centron kiu povas utili kiel solvanto de la problemoj.

## KRONOLOGIO DE REVOLUCIO

am la unua soveto de laboristoj kaj soldatoj kaj la caro demisiis en la monato marto de 1917. En tiu sama monato la Social-Demokrata Partio, kun burĝa sinteno, atingas la povon sub la gvidado de Kerensky kiu provis plibonigi la politikan kaj ekonomian situacion, malgraŭ li obstine daŭrigis la militon. Germanio komprenis ke por atingi favoran pacon kun Ruslando estis necesa nova registaro en Moskvo. Tial oni helpis al V.I. Lenin, estro

de la plej radikala flanko de la Socialista Partio, la bolĉevismo, atingi Ruslandon, li estis ekziliita en Svislando. En Aprilo li atingis Sanktan Peterburgon kaj en Oktobro li estris novan revolucion kiu kondukis la bolĉevismo en la registaron de la Rusa Imperio. La nova estraro socialigis la teron, deklaris la "diktaĵuron de la laboristaro", oni akordis la pacon kun Germanio kaj oni mortpafis la caran familion. Naskiĝis en tiu momento nova lando sub la restaĵoj de Imperio: la Unuiĝo de Socialistaj kaj Sovetaj Respublikoj.



N. Korbator, la unua kaj lasta Prezidanto de la U.S.S.R.

## LA EKONOMIO EN LA USSR

Antaŭ ol 1917 la rusa imperio inperio estis lando kun mezepoka ekonomia strukturo esence bazita sur ne-taŭga agrikulturo kune kun tre malgranda industria agado. La imperio estis ekspluata koloni-maniera, ĉiuj produktoj estis elaborataj en Moskvo kaj en Santa Peterburgo. Post la oktobra revolucio la soveta ekonomio transformiĝos kaj ĉi tio ŝanĝos ĉiujn aspektojn de la vivo. La privataj propraĵoj estis malpermesataj kaj la Stato restis la sola posedanto de la tero kaj de la industriaj produktiloj. La ekonomio estis ekde tiu momento planita, t.e. organizata laŭ sekvendaj linioj akorde kun la celoj atingeblaj.

En la agrikulturo la tero estis ekspluata en komunaĵ laborejoj kiuj produktis sufiĉajn manĝaĵojn por la soveta enloĝantaro. Tamen en la lastaj jaroj de la komunismo la ne-intereso en la produktado, pro la ne-enriĉigo de la ter-

kulturisto, la burokratiaj baroj kaj la ne-adekvata transporto, igis necesa la aĉetadon de esencaj produktoj en eksteraj landoj. Unu el la unuaj iniciatoj de la perestrojko estis la permeso al terkulturisto vendi minimuman parton de lia produktado rekte en la merkato laŭ liberaĵ prezoj, tamen ĉi tio ne signifis grandigi la nombron de produktaĵoj, sed male plialtigi la prezojn.

En la industria aspekto la USSR estis unu el la unuaj mondaj produktantoj de peza industrio; la kondiĉoj por ĉi tio estis kontentigaj, tiel la mineraloj produktitaj estis sufiĉaj, ne estis necese aĉeti la energion en la eksterlando kaj la laboristaro ne estis kostoza.

Tamen la soveta industrio havis preskaŭ kiel solan celon la militon, la ne-deca armil-kariero inter USSR kaj Usono provo-



kis ke preskaŭ ĉiujn indus-  
 triaj produktaĵoj de Sovet-  
 unuiĝo estis dediĉataj al la  
 milit-industrio, tiel la so-  
 veta familio ne disponis en  
 la merkato je sufiĉaj mal-  
 grandaj hejmaj aparatoj aŭ  
 veturiloj. En la lastaj jaroj  
 la intencoj de la soveta  
 registaro estis subskribi ak-  
 kordon kun Usono por limigi  
 la nombron de armiloj, kun  
 la ĉefa celo uzi tiun indus-  
 trion por ne-milita produk-  
 tado. La perestrojko ankaŭ  
 alportis novajn ideojn en la  
 soveta labor-rilato, tiel ek-  
 zemple salajri la laboris-  
 tojn laŭ la laboro produkti-  
 ta.

Kio okazos nun? La Komunis-  
 ta Partio de Sovetunuiĝo en  
 sia lasta kongreso antaŭ unu  
 jaro proponis "la transfor-  
 mon de la sistemo por atingi  
 ekonomion bazita je diversaj  
 formoj de propreco, tiel sta-  
 ta, komuna, privata kaj koo-  
 perativa". Pasis jam unu jaro  
 kaj la USSR ankoraŭ ne a-  
 doptis tiun novan ekonomi-

sistemon. Unu el la plej gravaj  
 ekonomiistoj de la USSR Stanis-  
 lav Satalin, aŭtoro de la "Pla-  
 no de la 500 Tagoj" forlasis la  
 Komunistan Partion kiam Gorba-  
 ĉov kaj sia konservema ekonomia  
 teamo preferis pli malrapidan  
 planon por la ekonomia transfor-  
 mo, kvankam la aŭgusta putĉ-fi-  
 asko tute certe supozos rekonsi-  
 deron de tiu rapida plano.

Verŝajne la ekonomio estas la  
 plej grava faktoro por atingi  
 politikan transformon, ĉar ne-  
 kontenta kaj malsata popolo es-  
 tas facile aliĝebla por nova  
 putĉo. Eble tion komprenis la  
 okcidenta riĉa "Grupo de la Sep"  
 kiam pozitive rekonsideris la  
 unuamomente rifuzo de ekonomia  
 helpo, kio sendube faciligos al  
 la soveta popolo trapasi la vig-  
 tron de la jaro 1992.



o o o o o o o o o o o o o  
 o o o o o o o o o o o o o o  
 o o o o o o o o o o o o o o

Oni memoras al ĉiuj eblaj interesitoj kiuj verŝajne emas anonci si-  
 ajn entreprenojn, servojn aŭ produktojn ke GAZETO ANDALUZIA estas malfer-  
 mita revuo por aperigi anoncojn, ien la prezoj:

- Kompleta paĝo: 2.000 Ptoj
- Duonpaĝo: 1.000 "
- Kvaron-paĝo: 500 "

Se oni aperigse tri sinsekvajn anoncojn oni nur pagas du.

# INTERVJUO KUN ... SOLO

*La panoramo de la muziko en Esperanto enriĉiĝis lastatempe per la alveno de nova muzikisto, temas pri SOLO, andaluzo kiu pasintjare kun la helpo de Andaluza Esperanto-Unuiĝo, eldonis altkvalitan diskon KOSMO-INFANO. Li jam koncertis en pluraj E-renkontiĝoj kaj siaj projektoj estas plenaj je laboro, disk-eldonado kaj revoj. GAZETO ANDALUZIA intencis de antaŭ multaj monatoj alvenigi en niajn paĝojn al ĉi nova kaj esperoplena muzikisto kaj ni profitis personan renkontiĝon por intervjui lin.*

*GAZETO ANDALUZIA: Juna, talenta kun eblecoj partopreni en la hispana rok-muziko, kial vi elektis kanti en Esperanto?*

SOLO: Bone, evidente estas multaj aferoj por respondi tian demandon, sed precipe mi devas diri ke unue mi ekde ĉiam serĉis du formojn por esprimi miajn sencojn pri la vivo, mi elektis muzikon. Je 12 jaroj mi estis kantanta en la hispana lingvo sed fine miaj muzikistoj ne estis bone esprimitaj, pro tio que mi trovis Esperanton, tia lingvo estas perfekta por produkti muzikon ĉar mi povas sangi ĉiujn nuancojn por adopti la teksta-ideon, kvankam ĉiukaze mi komponas rekte per teksto kaj muziko, evidente mi nun estas pli muzikisto ol esperantisto ĉar mi lernas Esperanton de antaŭ tri jaroj. Ekzistas alia spirita senco ĉar oni diras ke Universala Lingvo utilas por unuigi la homaron, ĉu ne? La simbolo de la 5-pinta stelo devenas ankaŭ de antikva erao ĉar ĉi estas kiel la pentagramo, same la stelo aperas en la Kaldea popolo kvin mil jaroj antaŭ ol Kristo. La stelo simbolas nian manon per 5 fingroj. Mi opinias definitive ke en Esperanto oni povas interpreti ĉiujn sencojn kaj tio estas interesa por la muzikistoj.

*G.A.: Kion vi povas alporti al la muziko en nia lingvo?*

SOLO: Mi povas alporti muzikajn aferojn al Esperanto, sed precipe mi opinias ke mi uzas nuancojn el diversaj kaj malsimilaj stiloj, ekz. etnikaj kaj haiti-ritmoj, popaj kaj klazikaj strukturoj, ankaŭ aperas kelkaj nuancoj pri rokko, kvankam mi ne konsideras min mem kiel rokka muzikisto ĉar mi pensas ke jam ekzistas sufiĉaj rokaj ensambloj kiuj evidente "rokkas" pli bone ol mi, prefereble mi uzas rokkon libere kaj naive. Tiel mi povas alporti ion nova al la Esperanto-muziko.

*G.A.: Kion vi volas esprimi per via muziko?*

SOLO: Per mia muziko mi deziras montri diversajn aspektojn pri la vivo, arto, filozofio, ktp. Definitive mi uzas kosmajn esencojn en mia muziko, ĉar mi pensas ke nia vivo dependas de nia makrokosma-maŝino kiu evoluas, movas, funkcias kaj funkciigas ĉion rapide. Evidente kiel spirita artisto mi revas kaj sonĝas kun natura-arta mondo kie mono utilos

al la homaro kaj ne inverse, ĉu ne? Pro tio mi deziras trovi sufiĉajn rimedojn por utiligi ilin por miaj art-filozofiaj projektoj, mi pensas per mia spirita menso sed mi ankaŭ ĉeestas en la vivo per miaj piedoj ene de la "kruela" vivo.

*G.A.: Malmultaj bonaj projektoj realiĝis ene de la Esperanto-movado, ĉu vi konsideras ke nia lingvo ne estas muzikema?*

SOLO: Mi pensas ke Esperanto povus esti la plej muzika lingvo, se ĝi estus sufiĉe konata kaj disvastigata, sed bedaŭrinde momente ni devas akcepti nian malgrandan sed fortan movadon, mi esperas ke baldaŭ multaj komencantoj venos en niajn idealojn, mi spertis jam pri tio ĉar mi vendis multajn diskojn al personoj kiuj ne konis Esperanton kaj la disko plaĉis al ili eble pro la produktado kaj prezentado, kaj tiel ili jam konas nian univel-salan lingvon. En Esperanto ekzistas multaj frazoj, vortoj, ktp. kiuj estas tre muzikemaj kaj mi deziras uzadi senĉese tiujn formojn, same okazas en la Angla lingvo.

*G.A.: Sed ĉu estas vere ke aliaj muzikistoj kiuj ne konas Esperanton nomis vin "frenezulo"?*

SOLO: Jes! aliaj muzikistoj kiuj ne konas nian "frenezulan ideon" en la komenco mokis pri mi, kiam mi komencis kanti en Esperanto, pro tio mi deflankiĝis el ili, nun ili komencas respekti min, eble ili estas la frenezuloj, ki-el oni diras "Pli bone ridas la lasta ridanto" ĉu ne?

*G.A.: Ĉu vi sukcesis en la rok-muziko en la hispana lingvo?*

SOLO: Ne! Mi ne sukcesis en la hispana muziko, ĉar eble mi ne trovis bonajn kunulojn porlabori. Mi ne estis bonŝanca pri tio, eble pro tio mia nomo SOLO. Mi konsideras ke KOSMO-INFANO estas mia ununura kaj serioza laboro dum mia arta vivo.



### G.A.: Kaj viaj projektoj por la estonteco?

SOLO: Mi havas multajn projektojn por la estonteco. Unue mi devas fini la vendadon de mia unua disko KOSMO-INFANO, poste mi deziras surbendigi aliajn. Mi ankaŭ dezirus koncerti en multaj kongresoj, mi koncertos en la venonta kongreso de SAI-amikaro kiu okazos dumpaske en Bor dozo (Francio) kaj ke kurioze temas pri Muziko kaj Esperanto. Ankaŭ oni invitis min partopreni en venonta Eŭropa Kongreso en Verono (Italio). Same mi priparolis pri partopreni en la venonta Kataluna Kongreso en Taragono kaj en la Hispana en Merido. Mi same volegus koncerti en la Internacia Junulara Kongreso okazonta en Montrealo kaj en la Universala Kongreso de Vieno, ambaŭ venontjare dum la Somero. Mi deziras koncerti ĉiuloke kaj disk-eldoni ankoraŭ 5 horojn pliaj de muziko en Esperanto, por montri al la mondo ke SOLO estas viva kaj luktante por la Universala Lingvo.

#### KURIOZAJ ! \*\*\*\*\*

#### CURIOSIDAD \*\*\*\*\*

La actividad de la Administracion Publica en España nunca se ha caracterizado por su claridad, comprension y facilidad. Sin embargo es cierto que en los últimos años la creación de ministerios, consejerías y organismos autónomos ha tendido a hacer más fácil la atención e información al público en general. Esto se ha debido principalmente a la Democracia, a nuevas directivas y al rejuvenecimiento del funcionariado. Aun cuando es claro está, nadie lo niega, existen todavía departamentos enclavados en el laberinto del papel impreso.

No sabemos si en Málaga tenemos un ejemplo de esas posturas, pero lo que sí es cierto es que en esta ciudad andaluza la Dirección Provincial de Trabajo se encuentra en la calle Babel nº 2, mientras que por el contrario el Instituto Nacional de la Seguridad Social se encuentra en la calle Esperanto nº 1. Quisiéramos pensar que el nombre de cada calle también pudiera ser un factor de comprensión y entendimiento.

\*\*\*\*\*

La agado de la Publika Administracio en Hispanio neniam estis agnoskata pro sia klareco kaj komprenado. Tamen estas certa afero ke en la lastaj jaroj la agado de ministerioj, konsilitejoj kaj autonomaj organismoj estis faciligi la informadon kaj la servon al la publiko. Ĉi tio tuldigas ĉefe al la Demokratio, la novaj legoj kaj al la junigo de la statoficistaro. Avankas komprenable, neniu povas negi tion, ankoraŭ ekzistas departementoj submetigitaj pro la labirinto de la presajoj.

Ni ne scias ĉu en Málaga ni disponas je ekzemploj de ambaŭ aferoj, tamen estas vere ke en ĉi andaluza urbo la Provinca Delegitejo pri Laboro troviĝas en la strato Babel n-ro 2, male la Nacia Instituto de Socia Sekureco estas en la strato Esperanto n-ro 1. Ni volus pensi ke la nomo la ĉiu strato ankaŭ povus esti grava faktoro pro la komprenigado kaj klarigado.

# 9<sup>aj</sup> ANDALUZIAJ LABORTAGOJ DE ESPERANTO

TOROKSO 12a-13a de Oktobro de 1991

Organizataj de la Andaluza Esperanto-Unuiĝo okazis en Torrox (Malago) la 9-aj Labortagoj de la Andaluza Esperantistaro kaj kadre de ĉi la Ĝenerala Asembleo de nia asocio. La renkontiĝo estis sufiĉe disvastigata kaj kune kun ĉi la senlaca organizantoj ofertis feri-semajnon apud la trankvilaj kaj belegaj plaĝoj de Torrox-Costa, tuj apud ĉi plaĝoj troviĝas la restadejo kie jam kutime okazas ĉi renkontiĝo. Ĉeestis al la feri-semajno grupeto de preskaŭ 30 gesamideanoj de Katalunio, Francio, Portugalio, Svedio kaj Andaluzio, kiuj ĉuis la kvietan etoson de Torrox kaj ankaŭ vojaĝis, invitataj de la organizantoj, al apudaj urboj Nerho kaj Frigiliano, kaj ankaŭ al Granado por viziti, bedaŭrinde sub tondra pluvado, la belegan Alhambron. Ankaŭ restis dum tiu semajno en Torrox tri ekskursoj aranĝataj de la pola turism-agentejo ESPERANTO-IUR, kiuj vizitis Andaluzion kaj Marokon. Dum la semajnfino okazis la labortagoj kie ĉeestis, krom kelkaj el la partoprenantoj en la feri-semajno, membroj de AEU de Malago, Seviljo kaj Kordovo.

## TEMOJ PRITRAKTITAJ:

La labor-tago malfermiĝis la 12an de Oktobro matene, pritraktante la jenajn temojn:

### TURISMO:

Julio Herrero kaj Antonio González, respondeculoj de la Turisma Sekcio de AEU, rakontis sian sperton dum ĉi jaro. Oni akceptis, gastis kaj akompanis al diversaj ekskursoj de ESPERANTO-IUR, kiuj vizitis Andaluzion, surbaze de sia restado en Torrox. Oni menciis ke dank'al la profitoj de ĉi vizitoj estis eble aĉeti telefakson por nia asocio. Oni diskutis la eblecon fondi turism-agentojn por oficialigi ĉi sekcion, la respondeculoj menciis ke ili mem jam pristudis ĉi eblecon, tamen ekzistis kelkajn ne-konvenaĵojn. AEU publike dankis la laboron de ambaŭ respondeculoj kaj oni kuraĝiĝis ilin daŭrigi la laboron.

La portugala partoprenantoj rakontis la turism-spertojn de sia asocio, ili di-



Torrox, turisma kaj marista vilaĝo en la Ĝuna Marbordo

ris ke pere de kooperativo oni aĉetis palaceton en alloga loko apud Coimbra, kie ili esperas gasti ĉiujn personojn kiuj deziras resti tie kontraŭ malalta pago. Same ili invitis ĉiujn andaluzojn partopreni en la ĉi-jara renkontiĝo de la Portugala Esperanto-Asocio kiŭ okazos en Olhao sude de Portugalio, la venontajn 14an kaj 15an de Decembro. AEU anoncis ke oni organizos ekskurson por ĉiuj kiuj deziras iri Portugalion en Decembro (vidu anoncon sur alia paĝo de ĉi tiu revuo).

### TRADUKADO:

Andrés Martín, prezidanto de AEU, elstaris la konvenon promocii la tradukadon inter esperantistoj. Li rakontis personajn spertojn, elstarante la utiligon de nia internacia lingvo en ĉi agado.

### KURSOJ:

Sabate vespere Andrés Martín, Antonio González, Alberto Franco kaj Manuel López proponis kontakti kun la Centroj de Profesoroj de Malago kaj Seviljo por organizi ĉu konkretajn kursojn ĉu longdaŭrajn seminariojn pri Esperanto kadre de oferto de la Andalusia Registaro por promocii kursojn inter la profesoroj. Antonio González rakontis personan sperton ĉi-rilate, temas pri kurso organizata de la Centro de Profesoroj de Velezo (Malago), ĉeestis 10 profesoroj de tiu zono dum du monatoj. Oni akordis same renovigi la strukturon de la Perkoresponda Kurso de AEU.

### ELDONADO:

Oni parolis pri la ĝis-nunaj eldonaĵoj produktitaj de nia asocio, t.e. la libro PANDEMONIO kaj la disko KOSMO-INFANO. Oni akordis la konvenon pligrandigi la disvastigon pri ambaŭ eldonaĵoj por atingi la kompletan elĉerpiĝon. La muzikisto SOLO anoncis ke li jam havas sufiĉan materialon por produkti alian diskon aŭ kasedon. Same oni rememoris la oferton de nia asocio pripensi serioze la eblan eldonadon de Eversio de la verko "Platero kaj Mi", se fine oni trovas sufiĉe taŭgan tradukon de ĉi tiu libro.



Oni diras ke Torrox posedas la plej agrablan klimaton en Eŭropo. Venu kaj gustumu Vi sen !

La nokto finiĝis per koncerto de nia malaga samideano SOLO, kie li prezentis siajn novajn kanzonojn.

Dimanĉe la 13an matene la respondeculoj de la turisma sekcio akompanis la tutajn ĉeestantarojn viziti la domojn kiujn oni luas por gastigi la vizitantojn de ESPERANTOTUR. La opinio pri ili estis tre favora pro sia komforto, beleco kaj eĉ lukso. Oni promenadis tra la toroksa marbordo kaj oni plenĝoĝiĝis apud la plaĝo. La lernantoj de la kurso de Velezo interparolis kun la esperantistaro kaj poste oni daŭrigis la programon de la labor-tagoj.

#### GAZETO ANDALUZIA:

La ĉi-jara eldonado de nia revuo estas tre kontentiga, aperis du altkvalitaj numeroj kaj oni posedas sufiĉan materialon por aliaj. Pro la ne-ebleco daŭrigi la laboron de la revuo José María Rodríguez elstaris la neceso ne nur anstataŭigi la laboron de unu konkreta persono, sed male formi teamon por eldoni akurate kaj altkvalite la revuon. Oni elektis tri personojn kiel novajn redaktorojn de la revuo: Alberto FRANCO, ĉefredaktoro respondeculo de la ricevado de artikoloj; Paqui CORRALES, respondeculino de la kompostado kaj José Francisco MARTÍN, respondeculo de la komputil-preparado. Oni fiksis lim-datojn por la laboro de la redaktoroj, kio ebligas dividi la taskojn por faciligi ilin. Oni aprobis eldoni 4 numerojn dum la jaro 1992.



Popola aspekto de Torrox

#### OFERTO DE TOROKSO POR VENONTIAJ KONGRESOJ:

Antonio González elstaris la taŭgecon de la toroksa restadejo por gastigi ne nur venontajn andaluziajn labor-tagojn, sed ankaŭ naciajn kaj internaciajn kongresojn kaj renkontiĝojn. Kvankam la fino de la diskutoj estis tre proksima oni pripensis la eblecon organizi venontjare en Torrox la Iberian Junularan Renkontiĝon kaj en 1994 la Hispanan Kongreson de Esperanto kaj eble internaciajn junularan seminarion en proksimaj jaroj. Kvankam nenion oni decidis tutcerte, oni lasis ĉi temojn por postaj renkontiĝoj.

La ĉi-jara andaluzia renkontiĝo finiĝis per gratulo kaj danko al la organizantoj ANTONIO GONZALEZ, JULIO HERRERO kaj PAQUI CORRALES. Oni adiaĝis ĉiujn geamikojn ĝis venontaj renkontiĝoj.

# Andaluzia Poezia

Oni min demandas ĉu mi Vin amas,  
mi respondas "eĉ ne vidi lin mi volas".  
Mi Vin amas pli ol ian vivon,  
per tio mi mensogas ĉiujn!

"Solea" kantata de Manuel Cobos "Libritos".

En ĉiuj landoj de l' mondo  
levigas la sun' kiam tagigas,  
al mi levigas dumnokte,  
eĉ la sun' al mi kontraŭas.

"Solea"

Asertas la saĝaj doktoroj  
ke l'forest' provokas forgeson,  
do mi provis vin forgesi  
keĵ forgesadi mi ne atingis.

"Solea"

Kiel la klara akvo de l' puto  
elgutas sur via hararo,  
same en la mondo ne ekzistu  
iu vin amanto kiel mi vin amas.

Facile kantata de Jaeno.

Iras kaj venas  
l'ondoĵ de l'mar'.  
Same kiel la malĝoĵoj kiuj min mortigas,  
mi ilia ne povas elteni plu.

"Solea"



# ESPERANTO, EĈ PLI OL LINGVO

Antaŭ ne tro longe, precize kadre de la 6a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazigita en Jerezo en Decembro de 1988, pluraj amantoj de Esperanto, inter kiuj Georgo Kamaĉo, Julio Herrero, Cema Rodriguez kaj la subskribanto de ĉi tiu redaktaĵo, neformale kunsidis por pritrakti kaj diskuti la versajnan polisemion, kiun la termino "esperanto" akiras en nia hispana lingvo. Krom ĝia principa signifo de ni ĉiuj konata, kiu signas la fenomenon de ni ĉiutage disvastigata kaj uzata, aperas ofte semantikaj vastiĝoj en la buŝoj de kolegoj kaj malkolegoj niaj. Nentendita aperis en unu mia tirkesto la folio kun kolekto de ekzempliĝoj de la citita riĉiĝo de la nomo "esperanto" kaj mi do pretis nerigore sed joviale ĝin prezenti, post poluro, al la publiko sur la paĝoj de *GAZETO ANDALUZIA*. La kapablo arte kaj gaje metafori estas facile rekonebla. Mi, interkrampe, ne forgesu, ke plejmulte la jenaj esprimoj fontis el andaluzaj buŝoj.

Unue, jen kolekto de uzoj tiritaj el amaskomunikiloj. "X" ĉiam staras por la objekto priparolata:

- El "X" es el esperanto del Africa Central. (E-o = pidgin).
- El inglés es el esperanto de hoy día. (E-o, ĉu hazarde? = internacia lingvo)
- Los políticos hablan en esperanto.
- Gil y Mendoza hablan en esperanto. (E-o = lingvaĵo kiu ne ebligas komunikadon)
- Las sevillanas son el esperanto del flamenco.  
El puré de verduras es el esperanto de las ensaladas.
- El Basic es el esperanto de la informática. (E-o = la normo, la facililo, l'o plej konata).
- "X" está degenerando como el esperanto.
- "X" está más muerto que el esperanto. (Sufiĉe esprimivaj...)
- Como las cosas sigan así vamos a acabar hablando en esperanto. (E-o = lingva situacio antaŭ la babela turo).
- El plan de empleo juvenil es el esperanto de los parados (?)

Kiel vi povas konstati, pluraj esprimoj estas bonintencaj, aliaj ne. Estu tiel aŭ aliel, ni ne povas ne montri rideton per ilia legado. Jen ni nin turnu al santipaj esprimoj produktitaj en nia rondo mem, aŭ pli precize, de tiuj kompatindaj akompanantoj en kongresoj, amikoj aŭ familianoj de esperantistoj:

- Las cabinas de Jerez son como el esperanto. (I.e., per ili, dum la kongresaj tagoj, oni povis komunikiĝi kun la tuta mondo, kaj senpage!!!)
- Has dejao la cama hecha un esperanto. (Vi supozu...)

- ¡Eres más caro que el esperanto!
- ¡Niño, traete la máquina del esperanto! (E-o = iu el niaj multaj sidejoj)
- ¡Este tío está hecho un esperanto! (E-o = esperpento).
- Tiene cara de esperanto.
- ¿Es que hablo en esperanto? (E-o = ĉina lingvo).

Ĉi vokative ĝi iam ŝprucis el la buŝo de niaj ĉarmaj krokodilinoj:

- ¡Ven pa cá, esperanto!
- ... so esperanti.ta! (kun io da ĉagreno)

Sed, plej neimagineblan sencon oni ne povis esprimi, kiam iu si vortigis:

Entre el y yo hay un esperanto.

Ĉi tiu kolekto ne devus finiĝi kaj mi do kuraĝigas la legantojn de *GAZETO ANDALUZIA* ĝin plivastigi kaj pliriĉigi per ĉiutagaĵa diro kiu aŭdiĝas en kaj ekster nia rondo. Ĉio, sendube, kontribuos al la plena kono de la naturo de "esperanto".

Alberto FRANCO, un esperanto.

\*\*\*\*\*

## ALIGU AL A.E.U. !!!

Ĉu vi deziras apogi la disvastigon de la internacia lingvo en Andaluzio? Se jes, sendu al ni leteron, sciu ke ni laboras por la disvastigo de la internacia lingvo en nia Andaluzia Lando, la Lingvo de la Peco kaj la Kulturo meritas Vian apogon!

Jara Kotizo por 1992 + 1.500 Ptoj  
 Apoga Kotizo + 2.500 "

Sendu poŝtmandaton al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Poŝtkesto 864  
 29080 MALAGA

# Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

# La neobŝetebla inklino de Antoni Gaix

1.-

Ĉio estas pli-malpli vera en nia vivo, krom rakontoj kiaj ĉi tiu, kiu estas tute malvera. Iam oni demandis al mi, ĉu mi iel celas speguli la realon en miaj noveloj, kaj mi respondis "ne", simple ĉar mi ne povas speguli ion, kio ne ekzistas. Se vi posedas tre klaran bildon pri kio estas la realo, diru al mi, kaj mi penos ĝin speguli venontfoje. Dum io tia ne ekzistos, mi agos laŭ mia bontrovo. Konkludu do, ke mi neniam troviĝis; ke mi ne faris kion mi certigas, ke mi faris, kaj, ke mi ne estis kia mi priskribas, ke mi estis. Ha! Ne forgesu, mia nomo estas Antoni Gaix.

2.-

Antoni Gaix celis verki fikcian rakonton, sed li hezitis pri la afero pro ebla enkarceriĝo. En lia socio mensogi publike estas punende. Li do decidis rakonti pri "siaj propraj viveroj" (neniu juĝisto kuraĝus reserĉi pri la reala bazo de tiuj). Tamen, por eviti problemojn, li solvis komenci ĉiam per "mi" kaj daŭrigi per ekzemple "Al mi" kaj eble fini per "Min". Tial estiĝus nenia dubo, ke ĉio okazis al li. Sur la marginoj de libro de Kilgore Trout li decidis ekverki noveleton, kiu fakte spegulis tiun de Trout (ne miskomprenu; temis pri spegulo, ne pri plagiato). Ĉe ia festo iu virino demandis al li, ĉu li estas verkisto. Antoni respondis per demando, ĉu ŝi scias, kio estas verkisto. Ŝi respondis, ke, nu, persono, kiu verkas. Antoni redemandis (estis ege malfacile al li respondi), ĉu ŝi scias kio estas verki. La virino respondis, ke, nu, skribi ion interesa, bela, zorge redaktita, montranta ion historion pri homaj pasioj, nu, resume, io literatureca. Antoni redemandis, kio estas la lasta io literatureca, kiun ŝi legis. Ŝi respondis, ke, nu, bone, tio estis antaŭlonge, sed se vi postulas, ke mi diru, nu, temas pri Ivanhoe. Antoni (finfine) respondis, ke li ne estas verkisto. Li rimarkis, ke ŝi estas brava atentigilo por fari bebojn, kaj li decidis meti ŝin en sian novelon por eviti enkarceriĝon. Krome li decidis ne plu ĉeesti festojn.

3.-

Kaj mi sola liberiĝis el la katastrofo por rakaĉi al vi. Aŭskultu:

Ĝis la lasta momento mi ne decidis preni la aviadilon. Verŝajne temas pri la plej ĉipa ebleco, sed mi ĉiam timis aviadilojn. 100 personoj ene de pli-malpli cilindra ŝtalajo kun flugiloj. La tero sufiĉe lontane sub ni. Sed feliĉe la kapitano trankviligis nin: Po 700 kilometrojn hore. Alteco: 3000 metroj. Post tio mi svenis kaj sonĝis pri la virino, kiu ĉatis Walter Scott. Iu stevardino stumblis kontraŭ unu mia piedo, kiun mi senatente lasis sur la koridoro. Mi vekigis. Ho! Pardonu. Ĉu vi dezirus legi iun alilingvan jurnalon? Kio nova en la mondo? Nu, nur en-

landa milito en Ĉinio. Ĉu vere? (Kurioze nia celloko estas internacia kongreso en Pekino). La kapitano avertis, ke oni nuligas la flugon. kaj, ke oni lasos nin en Vieno, kie ni povos preni revenflugon al Madrido. En tiu momento mi konstatis, ke du brunvizaĝaj dupieduloj staras antaŭ ni, en minaca pozo, ĉiu el kiu tenis celantan pistolon. Ninio graba uka zos al bi, se bi ne staras, faras strangan movon aŭ krias. Ristu trambi laj. Nia selloko sandiĝas al Ribato! Mi garantias, ke mi ne plu prenos aviadilon. Iom poste mi decidis elpoŝigi mian libron de Kilgore Trout por iom distriĝi kaj forgesi la cirkonstancoj kiujn tiuj teroristoj strukturis al ni. Kiun bi faras? Ĉu vi celas min, sinjoro? Jes, bi, kiun bi faras, ristu semmoba aŭ mi mortpafos bin! Nu, mi nur celis legi, temas pri libro, ĉu mi ne rajtas legi? Jes, set por la binunta fojo, ĉi u, ĉiu abirtu pri kio selas fari antaŭ ol fari, ĉu komprenite? Se ne, mi mortpafos bin. Unu el ili alproksimiĝis min kaj esploris la enhavon de mia sako. Nur, nur libroj enestas! Set libroj povas esti pli danderaĵoj ol pistuloj. Tute ne! Estas nur paĝoj kaj literoj. Kiel tio povas noci iun? Felice mi havis nur plurajn ekzemplerojn de Vonnegut kaj B.S. Johnson. Muntru biajn librojn, bi ĉi uj!!! Iu, kiu sidis ĉe la lasta vico montris libron de Rushdie kaj oni mortpafis lin tuj. Tiu puno, tiu, taŭgu kiel ikzemplu kaj abirtu por bi ĉiuj! Ĉu komprenite? Iu malbonŝanculo konstatis sur sia propra haŭto, ke "libroj" povas esti sufiĉe danderaĵoj. Subite oni aŭdis bruojn ene de la kapitana kupeo: verŝajne pli aj teroristoj troviĝis tie. Oni povis aŭskulti pafon, eble du. Post tio la aviadilo komencis huli, eble pro stumblo kontraŭ nubo, eble pro stumblo kontraŭ stirilo. La teroristoj ne povas sciis direkti aviadilon, kion mi konkludis pro krioj venantaj el la ĉefkupeo: kium da lumoj kaj saltiluj!!! La aviadilo adiaŭis nostalgie siaj plifruan horizontalan pozicion kaj salutis la novan direkton. Ha! Mi mi fordesas. Mi estas la sola, kiu ne mortis post la fina karambolo!



"And I only am escaped alone to tell thee". Job.

4.-

Antoni Gaix estas mondero. Li konstatis tion facile kaj decidis ligi kun aliaj monderoj. Sed tuj poste li iom cerbumis, kaj konkludis ke li devas klasi ĉiujn monderojn, unue en grandajn grupojn, due en malpli grandajn, ĉis li sukcesos distingi la monderojn, kun kiuj li dev amikiĝi. Li alvenis al kontentiga solvo kaj nomis tiun plej malgrandan grupon "virinoj". Ĉar li sciis, kiel ili aspektas (pro tio, ke li ne pretiĝis la klasadon), li decidis renkonti ekzempleron apartenantan tia speco. La plej trafa loko estis nokta trinkejo. Tiaj svarmis en la kvartalo. Post hezito li direktis siajn paŝojn al "acid bar" kaj tuj eniris. Ne estis tro lume en tiu nova spaco. La miksaĵo de fumo, muziko kaj lumo venanta el ludmaŝinoj kreis pitoreske impresionisman etoson, kiun li notis sur paperon por sia noveleto. Tie fone, sola ĉe tablo,

dis la celo de liaj rigardoj. Si posedis du el tiuj virinaj belajoj, kiujn li decidis nomi "mamoj", sufiĉe kruelaj, kies cicoj (plia nomo, kiun li devis ĉerpi pro sia emo priskribi la naturon) tridimensiigis la okulojn de tiu grandega Mr. Smiley, kiu agrable kuŝis sur ŝia t-ĉemizo. Where's the acid party?...Ĉu vi scias, kie oni aranĝas tian feston? Li demandis, dum bezite sidiĝis sur seĝo apud ŝi. Ne, hi, hi, hi, kaj vi? Semidecide li respondis: ĉe mi! Post pluraj rumaĵoj ŝi akceptis akompani ĉe lin. Mi devos zorge agi. Mi klasis ilin nur laŭ aspekto, ne laŭ konduto. Mi malkonas ilian enan naturon. Sed li rapide komprenis ilian enan naturon, kiam ŝi nude kuŝis sur lia lito kaj montris ĝin al li. Antoni gapiis kaj konkludis: nur Kilgore Trout kapablas ĉerpi nomon por tio. Post pluraj minutoj li sentis ion, kion li jam spertis antaŭlonge, kiam televidis muzikprogramon pri Madonna. Tiam li nomis tion "malvelkigado"; nun li decidis renomi per "orgasmo". Si strukturis al li neforĝindajn cirkonstancojn. Je la fino li kapablis diri nur dankon kaj donacis al ŝi ekzempleron de Ivanhoe. Si redonis sian dankemon kaj respondis, ke ŝi aĉetos librobreton por ĝi. Estis akcidea punkto, kiam ili forlasis lian domon. Ĉiuj surstrataj virinoj rigardis lin ion avide, kvazaŭ ili sciis, ke Antoni donis novan sencon al ilia vivo per sia klasado.

5.-

Antoni Gaix celis verki fikcian rakonton. Nu, nur rakonton, sen pleonasmo (laŭ poeta precizigo). Antoni Gaix ne aspiris originalecon, ĉar li kontrolis, ke io tia malfacile atingblas. Antoni Gaix suspektis, ke oni devas rigardi la tutan korpon de ekzistanta literaturo kiel ian limbon, el kiu la aŭtoroj ĉerpu rolulojn, historiojn, temojn. Literaturo estu do referenca tasko. Nur genioj, kiaj ekzemple Kilgore Trout, kapablis plivastigi tiun limbon per io freŝe nova. Antoni Gaix ne estis genio, nur talentulo. Sur la margenoj de libro de Kilgore Trout li decidis ekverki noveleton. Li sin montris tre serena antaŭ la fakto, ke lia verka io celis speguli tiun de Trout. Antoni Gaix nur aŭdacis deklari kion aliaj ne kuraĝis. Fakte lia noveleto komenciĝis tiele.

Aŭskultu:

6.-

Ekzistas du klasoj de homoj: kiuj kuraĝas plenumi kion ili deziras, kaj kiuj male agas. Mi apartenas al la unua grupo, kaj jen kial mi murdis mian edzinon. Mi penis trafi kaŭzon al tiu efiko kaj helpe de



pluraj pripsikologiaj libroj falis en trisolvan konkludon: 1.- Pluraj bizaraj sonĝoj, kiuj hantadis mian dormon je naŭza ofte. 2.- La fakto, ke ŝi sin montras tre vigla por frakasi, per strukturado de aĉaj cir--konstancoj, la momentojn, kiam mi plej amuziĝas. 3.- Sia mallerta kaj pigra maniero karesi mian kacon.

La krimon mi muntadis senhaste, ĉar nenio urĝis min. Ĝian malvol--von mi strukturis lete, joviale, zorgante pri ĉiaj detaloj. Mi eĉ mi--ris pri mia propra lerteco pretigi ion, pri kio mi ne spertis. Kompre--neble nenion perceptis, sed rimarkis naive de tempo al tempo...

- Kiel trankvila vi vin montras lastatempe, aĉuleto! Iia vi devus resti porĉiame, malkverelema, obeanta kaj plenumanta ĉiujn miajn dezi--rojn. Kiom multe mi amas vin, aĉuleto! Ha! Memoru, morgaŭ vi ne povos televidi la matĉon, kara. Se vi sciis, kiom multe mi bedaŭras! Mi kom--patis vin centfoje. Iemas pri mia patrino, kara, kiu venos viziti nin, kaj vi jam scias, ke ŝi abomenas televidi.

- Do, ŝi simple ne faru!

- Kiel petolema vi estas, kara aĉuleto! Vi jam scias, ke eĉ sal--titan televidilon ŝi ne povas elteni.

- Tute ne gravas! Vi jam scias, kiom multe plaĉas al mi via kon--verso kaj ŝia ĉeesto.

- Ho, mia kara. Kiom multe vi ŝanĝiĝis! Mia amo al vi kreskas geo--metrvice!



Mian deziron trafi tiun drogon mi ne po--vis montri precize. Jen naiva demando al tiu apotekisto, jen inside atingi indikojn de tiu alia oficinisto pri tiu aŭ alia kunmetaĵo. Finfine mi trafis la drogon: ĝi ka--pablas estigi tujan korhalton, se io vigle ekscitas la preninton. Poste nenio spur--pri ĝi restas.

Kaj mi envenis al ŝi plurfoje. Mi ne es--tis tro severa rilate miajn penetradojn Ĉar mi indulge decidis, ke ŝi ion ĝuu anta--ol la fina spasma. Ŝi orgasme kriis por la lasta fojo. Tiel ŝi finiĝis mia dola fikad--kaj ŝia vivo.

La sekvantan matenon D-ro Irout atestis, ke ŝi mortis de brusta--goro.

7.-

Antoni Gaix haste lernis abomeni la recenzistojn. "Lia neobjete--bla inklino verki absurdajn rakontojn". "Lia eskapema peniko, gvido de absurda preciozeco, tiras sian energion el tiu realo, kiun ĉiu ir--

ventas al si". Cio venanta el ili ĝajnis al li vanta fatraso. Vidanta tra la fenestro solenan virinon, kies mamoj direktis kadenca ritmo, li celis, daŭrigis la masturbadon kaj forgesis tiun ĝenan aferon pri recenzi-  
zistoj.

8.-

Antoni songis, ke li verkas rakonton pri milito. Sed kiam li vekidis, li kapablis memori eĉ ne unu vorton el ĝi. Tamen li memoras, kiom akre la heroo plendis pri tiu homa stultajo, kiom harstarige li pentris la militan kaoson: sanga buĉado, neforgeseblaj vizaĝoj de homa sufero, la plej kruela el ĉiaj spektakloj. Ankor' batas en lia menso la sendirektaĵaj pafoj, la ploroj de junuloj memorantaj siajn fianĉinojn por la lasta fojo, la minacaj fremdlingvaj krioj iele-trapele dievastigitaj tra la aero. Ankor' bildigas antaŭ liaj okuloj la naŭza koloro de la ĉielo, la dispecigitaj hompartoj sur la bataalkampo, la trafitaĵaj korpoj de liaj kamaradoj eterne falantaĵaj. Ankor' li kapablas eĉ flari la nekongrueblan odoron de milito, benzino, napaĵo, svito, urino, koto, sango, feko... Tamen li ne kapablas memori kiajn precizajn vortojn li uzis por cion priskribi, aĉ, kiom da paĝoj li plenigis. Antoni songis, ke li verkas rakonton pri milito. Sed li eĉ ne kapablas memori kiu luktis kontraŭ kiu. Li sciis nur, ne estis kruela, aĉ, ke antaŭ la cetera mondo li de nun sentos honton aparteni al la homa speco. Antoni ploris por la unua fojo.

9.-

Kilgore Trout ne ekzistas. Li estas simpla mensogo. Post la legado de iaj komentarioj pri libro de Vonnegut mi sciigis, ke li ekzistis nur en la menso de la aŭtoro. Nura ideo. Mi, kiu estiel ajna Billy Pilgrim, aŭdacis reinventi mian ekziston, kiu plirue malhavis cion kontentigan aŭ plezurigan por pliviri, nun troviĝas amare sola, sencela, antaŭ mendetruo. Tamen mi spertis, kiel li ekzistas, kiel miaj paĝoj plenigas dank'aj li, kiel mi aprezis lian kuneston en la plej amaraĵaj momentoj. Mi ne povas kredi je tiaj senbazaj komentarioj. Aĥ! Aĉaj recenzistoj, vi denove! Tio certe ŝuldiĝas al via emo trompi ĉies vivojn. Li ekzistas! Li ekzistas!! Kilgore Trout ekzistas!!! kaj mi krios milfoje ĝis mi restos senvoĉa.

Putriĝu!



ALBERTO FRANCO RAMIREZ

# $E=mc^2$ \* Sciencia Paĝo

En 1714 oni enskribis novan inventon, temis laŭ deskripto de tiu epoko pri "maŝino kiu presigas literojn kiel en la normala skribado, utilante tre efike en publikaĵoj". Hodiaŭ tiu invento estas nepre por ĉiuj ni: temas pri la tajpilo aŭ skrib-maŝino.

Post tiu de 1714, aliaj en 1808 kaj en 1836 perfektigis la unuan sistemon. Sed okazis en 1872 kiam 6 inĝenieroj en Usono konstruis la Remington kaj la Remington 2, kiu povis esti uzata tre facile en kiu ajn oficejo kaj kapablis skribi majuskle kaj minuskle, sub streki, ktp.

La nova invento eniris baldaŭ en la oficejojn, tamen la tiu-epo kaj oficistoj protestis kontraŭ tiu laboro, pro la ne-komforta tasko por la muskloj de la mano. Ĉi tiu unus rifuzo de la oficistoj provokis ke baldaŭ multaj junulinoj praktikis lerte la skribadon per tiu kvindek-klava maŝino, anstataŭ uzi inkon kaj plumon. Naskiĝis tiam tiuj grandegaj oficejoj kun dekoj da oficistinoj taspante sen-lace kaj brue.

Inter 1874 kaj 1915 oni konstruis pli ol 500 malsamaj modeloj de tajpiloj. En 1929 la itala firmao Olivetti fondis la entreprenon Hispano-Olivetti, komencigis la produktadon kaj komercadon en Hispanio.

Tamen kiam pli amplekse perfektigis la tajpiloj estis en la lastaj 30 jaroj. En 1969 la elektro

estis aplikata al la skrib-maŝinoj, en tiu jardeko IBM konstruis la unuaj elektraj tajpiloj. La sistemo egalas al la antikva, tamen oni anstataŭigis la forton de la mano per la impulso de la elektro. Poste oni enmetis novajn aplikojn la bastonetoj estis anstataŭigitaj de sfero kiu trairis sur la papero. Tamen eĉ ĉi tio jam apartenas al la estinteco, hodiaŭ oni parolas pri ink-jeton sur la papero, presi per lasera sistemo aŭ eĉ presi literojn per brulig-sistemo.

Kaj kiel estas la estonteco? La respondo ŝajnas evidenta, hodiaŭ la plej perfektaj tajpiloj enhavas memor-kapablon, komputadon kaj ekranon kie oni povas antaŭvidi la tekston. Estontece eĉ ne estos neceso skribi sur papero, oni povos skribi sur-ekrane kaj profiti la nokton, kiam la tajpistoj ripozas kaj telefon-linioj estas pli cipaj kaj ne-okupataj por sendi la mesaĝon ne la papero. Sed se ni ne bezonas la foliojn, kial uzi la kievaron? En Japanio oni jam laboras por uzi rekte la voĉon de la tajpisto kaj ne la manojn, tamen atingi ĉi tion estos malfacila kvankam kelkaj maŝinoj jam komencas kaj eĉ uzas la voĉon ekzemple la poskaikviloj.



# Ĝise...

Vi, leganto, jam preskaŭ finis la legadon de la numero 28a de la revuo *GAZETO ANDALUZIA* kaj verŝajne jen la plej taŭga momento por in diki ke ĉi tie finiĝas etapo en la eldonado de nia nacia gazeto. De la jaro 1988, kiam la jereza kongreso respondeciĝis min aperigi la revuon, entute aperis 7 numeroj, do dekoj da artikoloj, informoj, komentarioj, amuzajoj, desegnoj, mapoj, ktp. plenigis la paĝojn de nia blank-verda revuo. Ĉu iu artikolo ĉi tie publikita kaptis iufoje Vian atenton? Se jes, ni tre ĝojas scii ke por Vi, iamaniere, estis utila la laboro; kaj se ne, nu same dankon ĉar Vi almenaŭ havis enmane ĉi revuon.

Oni provis certigi la ekziston kaj daŭrigi la operadon de *GAZETO ANDALUZIA*, eble mi suferis ne-akuratec-malsanon, tamen aliflanke oni laboris por havigi al Vi sufiĉe legindan gazeton. Esperanto en Andaluzio estas preskaŭ ne-trairitigita vojo, la plenumanta laboro ankoraŭ estas pli granda ol tiuj detaloj kiujn ni, ĉu izolite ĉu asocie, plenumis. Sed ĉu tio ne estas alloga? Ĉu ne kuragiĝas nin scii ke ni, pionire, plenigas la blankajn paĝojn de ĵus komencita libro! Sendube ni respondas: Jes! Esperanto estos en Andaluzio tia kiel ni deziras, aŭ pli bone dirite tia kiel ni laboros por ĝi, ni frapos ĉiajn pordojn por peti kunlaboron sed ni devas kalkuli esence je niaj propraj fortoj. Kaj *GAZETO ANDALUZIO* estas unu el la atestoj pri la ekzisto de la internacia lingvo en nia andaluzia lando.

Ne-prokrastigeblaj taskoj devigas min forlasi la Esperanto-Movadon dum unu jaro kaj pro tio daŭrigi la legadon de la revuo estas por mi tute maleble. La ĵusa andaluzia E-kunveno jam nomumis novajn geredaktorojn, kaj mi scias ke ili plialtigos la kvaliton en la eldonado de la revuo kaj evitos la prokrastigon de la numeroj. Ne temas pri anstataŭigi personon sed male formi teamon, Alberto, Paqui kaj José Francisco, la novaj redaktoroj, serioze laboros por tio. *GAZETO ANDALUZIA* ja estas sufiĉe grava kaj meritas ne unupersonan dediĉon sed planigadon, merkatan ellaboradon kaj modernegan presadon, do oni bezonas teamon.

Kompreneble la revuo restas, kiel antaŭe, malfermita. Via kunlaboro estas tute necesa, legu nin, komentariu, diskonigu ĝian ekziston inter Via esperantista amikaro kaj se vi kapablas sendu al ni artikolon. Krom tio kia ajn kritiko, ĉu favora ĉu malfavora, estos tre bone akceptata.

Al mi restas nur danki ĉiujn legantojn, ĉiujn kiuj iufoje kontaktis kun mi aŭ sendis rekte ian kunlaboron, kaj tre speciale al Julio Herrero, Andrés Martín kaj Concha Sánchez.

# AMUZAĴOJ

A) ĈU VI KONAS LA CERTAN SIGNIFON ?

BUDO:

- a) Senluka butiketo el ligna tabulo.
- b) Religia ideo en orienta lando.
- c) Malgranda parto de la piedo de kelkaj bestoj.

MEVO:

- a) Movebla objekto farita el ligno.
- b) Bonodora rezino el afrika lando.
- c) Blanka kaj nigra birdo kun longaj flugiloj.

JUMO:

- a) Strio el sedo por cirkambigi la talion.
- b) Malakuta kaj obtusa bruo.
- c) Akvuma trinkajo el fruktoj.

GRAFO:

- a) Arto reprezenti objekton per desegno.
- b) Nigra eŭropa birdo.
- c) Korela titolo.

B) SILABA KRUCVORTENIGMO: - (metu unu silabon en ĉiu kvadrato)

	A	B	C	Ĉ
1				
2		■		
3				■
4	■		■	
5				

1. Oficiisto kiu legigas kontraktojn.
2. Ekkrio tro malfelica. Fari specialan signon por distingi ion.
3. Parto de la filozofio studanta la rezonadon.
4. Prepozicio. Nomo de litero.
5. Ano de religio.

- 
- A. Malbona romano. Adjektive, nomo de litero.
  - B. Adjektive, nomo de litero. Feno treto en pordo aŭ muro destinta por interparoli aŭ pasigi ion.
  - C. Distingo de io aŭ io.
  - Ĉ. Inverse, persona pronomo. Besto.

B	E	L	G	I	C		K	A	K	T	O
A	M		A	Z	E	N	O		L		
K	A	R	L	O		E	N	D	I	V	I
A	N	Ĝ	E	L	O		C	I	T	R	O
N	I		R	E	F	R	E	N	O		H
A		A	I	C		O	S	A	R	G	
L	A	E	O			M	I	M	O		G
O	K	A		A		B	I	I		E	R
J	A	P	A	N	I	O		T	E	L	O
	N	A	J	A	D		N	O	P	O	T
A	T	R	O	F	I	O	S		I	F	E
N	O	I	C	I	L	O		L	E	S	
A			L	I	A		I	E	R	K	
T	I	E		A	E	R	O		P	I	A
O	T	N	O	K		E	D	I	S		
M	A	I		S	U	S	U	R	I		I
I		Ĝ	U	I		T	R	I	O	D	O
O		O	L	O	T	I	T			E	N

P	A	R	A	D	I	Z	O		T	E	O
U	N	A	K	I	C	E	P		E	N	E
Ŝ	C	S	E	C		B	R	I	L	A	S
T	R	I			F	R	O		E	M	E
I	M	S	O			O	K		P	I	
S	A	M	E	R	T			L	E	Ĝ	O
T	L	O			A	L	K	U	R	I	S
O	A		O	B	S	T	I	N	O		C
	J	A	G	U	A	R	O	S		M	I
F		N	I	S				O	D	E	L
I	Ĝ	I	V	O	L	E			E	N	A
L	I	M	O		I	F		O	N	U	T
A	R	A		O	B	I	S		T	E	O
U	A	L	B	L	E	K	U		O	T	R
E	F	E	M	E	R	I	D	O	S		O
N	O		I	T	E		O	Z		E	T
T		I		S	C	I		O	O	E	
O	B	U	N		O	N	E	R	G	A	Z

Krucvorttenigmo de la Numero 25.-

Krucvorttenigmo de la Numero 26

\* LUDU KUN NI \*

I.- Entute estas 20 trianguloj.

II.- KULTURA TESTO.

- 1 - c / 6 - c
- 2 - d / 7 - c
- 3 - a / 8 - b
- 4 - c / 9 - b
- 5 - c / 10 - d

III.- REBUSO.

Pri la roma senato.  
(la roma sen ato).

IV.- LITERSUPO

V	O	L	A	P	U	K	F	G	R	S	B
T	H	K	I	S	B	J	C	U	A	P	O
J	V	E	N	R	C	Z	V	I	A	C	L
M	L	A	T	N	E	D	C	C	O	N	L
T	F	G	E	S	V	G	N	R	M	S	A
J	N	P	R	A	O	A	U	S	G	M	C
L	A	B	L	G	I	B	A	U	E	F	B
V	M	F	I	D	P	L	U	L	R	L	P
I	L	G	N	M	H	N	O	V	I	A	L
K	F	E	G	C	S	P	R	K	G	M	I
T	S	M	U	M	A	K	L	A	J	V	T
O	T	N	A	R	E	P	S	E	K	F	A

